

Beinahe der erste Esperanto-Staat

In Kelmis wurde 1908 die Staatsgründung geplant

Höhepunkt des 25. „Internacia Festivalo“ war ein ganztägiger Ausflug, der über Aachen nach Kelmis führte. Dort wurde vor 100 Jahren von Esperantisten die Gründung eines Esperanto-Staates geplant. Ein nur gut drei Quadratkilometer großes Gebiet, „Neutral Moresnet“, sollte dessen Staatsgebiet werden. Das Gebiet war zum neutralen Gebiet erklärt worden, nachdem sich die im 19. Jahrhundert Herrschenden wegen der reichen Zinkerzvorkommen nicht auf eine Zuordnung zu einem Staatsgebiet einigen wollten. Heute ist das keilförmige Stück Land, das sich vom Dreiländereck an den Grenzen von Belgien, Deutschland und den Niederlanden nach Süden erstreckt, Teil von Belgien.

Dagmar Leupold machte den Beinahe-Esperantostaat und Esperanto zum Gegenstand ihres Romans *Grüner Engel, Blaues Land* (s. *Esperanto aktuell* 2007/5, S. 18-19).



Himno de Amikejo

Nova vorto flugas tra la mondo,
En Esperantujo jam konata:
Amikejo eĥas en la rondo,
Vort' de ĉiuj ĝoje akceptata.

Propran hejmon havas Esperanto
Nun en nia bela Amikejo,
Kaj por ĉiu ajn vizitanto
Estas ĝi komforta kongresejo.

Se tro granda ŝajnas nia ago,
Multaj estas niaj favorantoj,
Kaj sur blua Moresneta lago
Sonos Esperantaj ĝojkantoj.

Amikejon venu do, homaro:
Vivu nia internacieco:
Ni oferu ĉiuj ĉe l'altaro,
Ĉe l'altaro de la amikeco.

Peka



Oben: Die Hauptstraße von Kelmis. Links: Im Zentrum vom Kelmis befindet sich die Gaststätte „Select“, in der 1908 Esperantisten den Beschluss fassten, einen neutralen Esperanto-Staat zu gründen. Mitte: Am Grenzstein am Dreiländereck zwischen den Niederlanden, Belgien und Deutschland sind die Grenzen zwischen den Staaten im Pflaster markiert. Der kleine Winkel im Süden markiert das ehemalige Neutral-Moresnet. Links im Bild ist Belgien, rechts Deutschland. Die Niederlande liegen links hinter dem Grenzstein.

El la estraro de Germana Esperanto-Asocio

Telefonkonferenco

La antaŭvidita komuna estrarkunsido kun Germana Esperanto-Junularo dum la Internacia Seminario ne okazis, sed la IŜon ja partoprenis tri estraranoj, kiuj estis je dispono. Anstataŭe la estraro elprovis telefonkonferencon je la 30a de novembro 2008, laŭ instigo kaj preparo de Rainer Kurz. Tiel oni ŝparas tempon kaj monon, sed montriĝis, ke la neevitebla hasto ne permesas trankvilan diskutadon. Por rapida interŝanĝo de informoj ĝi tamen taŭgas.

Problemoj kun la impost-oficejo

Por la jaroj 2005-2007 la unuan fondon necesis, fari la impostdeklaron al la koncerna impost-oficejo en Berlin. Antaŭe en Freiburg neniam estis problemoj. Malgraŭ detala preparo de la dokumentoj venis postuloj de pliprecizigoj, kaj fine de 2008 telefon-alvoko, ke ankaŭ la novaj informoj ne kontentigis la ŝajne tre rigoran kaj obstinan oficistinon. Do, la prezidanto devos helpe de la kunestraranoj provi tion je la tria fojo. La komun-utileco tamen ne estas en danĝero.

iDiS komencis funkcii

Ne ĝustatempe, sed almenaŭ antaŭ la fino de 2008, ĉiuj membrodatumoj transiris el la malnova administrado en la novan sistemon iDiS. Momente nur kelkaj estraranoj uzas iDiS-on kaj luktas kun la kutimaj komencaj programteknikaj problemoj. Ankoraŭ la stato ne permesas, ke aktivuloj de landaj ligoj kaj lokaj grupoj uzu ĝin. Plej bedaŭrinde estas, ke mankas ĝis nun la indikoj de pagoj kaj de ĝirpermesiloj, tiel ke la jarfinaj laboroj estas precipe komplikaj. Parte la taskoj devas esti farataj en la malnova sistemo. La estraro esperas, ke iDiS rapide progresos kaj ne okazos prokrastoj, produkti la eksped-etikedojn por *Esperanto aktuel* kaj la kvitancojn por la donacoj el la jaro 2008.

Rudolf Fischer



Berlino – Ĉu nova administra centro de Esperanto?

Domo en Berlino evoluas al nova administra centro de Esperanto en Germanio. En venonta numero de *Esperanto aktuel* leĝeblos intervjuo kun la organizantoj. Ili parolos pri la ĝisnunaj laboroj kaj siaj planoj. *red.*

Esperanto-Stand auf der Expolingua

Vom 14.-16. November 2008 fand in Berlin die internationale Messe für Sprachen und Kulturen statt. Mit dabei war Esperanto. Die Expolingua wird hauptsächlich von Schülern, Eltern, Auszubildenden, Studierenden, Lehrern, Dozenten, Professoren und Übersetzern besucht. Alle Besucher haben in der Regel ein großes Interesse an Fremdsprachen und Kulturen und damit auch an Esperanto. Geholfen haben etliche Mitarbeiter der Deutschen Esperanto-Jugend und des Deutschen Esperanto-Bundes. Allen Mitarbeitern an dieser Stelle einen großen Dank. Ein Dank auch allen, die sich finanziell an der Teilnahme beteiligt haben. Es wurden etliche interessante Gespräche geführt. Verwendet wurde auch das neue Informationsmaterial des DEB und eine neue Werbepostkarte für die Massenverteilung. Besonders gut fanden die Interessenten, dass auf der Werbepostkarte alle wichtigen Netzadressen zu finden waren. „Esperanto-Informationsarbeit auf Messen ist wichtig“, so

der Generalsekretär des Deutschen Esperanto-Bundes Martin Schäffer. „Es geht nichts über das direkte Gespräch mit den Interessenten. Die Expolingua trifft zudem unsere Zielgruppe sehr gut“. Auch konnten die Helfer Kontakte zu etlichen Sprachverlagen und Organisationen knüpfen. Am Sonntag Nachmittag konnten die Expolingua-Besucher einen kleinen Esperanto-Sprachkurs besuchen (45 Minuten). Im Januar fand ein Esperanto-Schnupperkurs für die Expolingua-Interessenten unter Leitung von Felix Zesch in Berlin statt. Insgesamt also ein sehr guter Erfolg! *Martin Schäffer*

Gazetoj:

Esperanto aktuel je la kvina rango

En 2008 la plej grandaj gazetoj denove estis *La Ondo de Esperanto*, *Esperanto*, *Sennaciulo*, *Monato* kaj *Esperanto aktuel*. *La Ondo de Esperanto* en 2008 superis *Monaton*, la plej grandan gazeton de 2007.

titolo	paĝoj	formato	m ²
La Ondo de Esp.	308	205x290	18,3
Monato	308	199x268	15,9
Sennaciulo	236	210x296	14,6
Esperanto	264	188x266	13,2
Esperanto aktuel	168	210x297	10,5

La redakcio de *Esperanto aktuel* dankas al ĉiuj, kiuj sendis interŝanĝekzemplerojn. Ni sendas tiujn gazetojn al la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. *red.*

Bamberg:

100-Jahrfeier der Esperanto-Gruppe Bamberg und bayerisches Zamenhoffest

Am 20. Dezember kamen die Mitglieder der Bayerischen Esperanto-Liga nach Bamberg, diesmal, um ihren für Bayern zentralen Zamenhof-Tag im Rahmen der Feier zum 100-jährigen Bestehen der dortigen Ortsgruppe zu veranstalten.

Der Tag begann vor dem Dom mit einer Stadtführung „1000 Jahre Bistum Bamberg“ durch Gästeführerin Lore Kleemann. Bei einem anschließenden Empfang im Rokokosaal des Bamberger Rathauses betonte der Bamberger Oberbürgermeister Andreas Starke in seinem Grußwort, „die Idee einer Sprache, die es allen Menschen ermöglicht, sich gleichberechtigt und frei verständigen zu können“, sei wichtig gerade in einer Zeit, die geprägt sei von einer „zunehmenden Globalisierung einerseits und von einem drohenden ‚Kampf der Kulturen‘ andererseits“. Daher sei „Esperanto ein starkes Symbol der Völkerverständigung und aktueller denn je.“

Der BELO-Vorsitzende Armin Grötzner (unten, links) dankte dem Oberbürgermeister für die ermutigenden Worte, komme es doch gerade heute, da viele von Esperanto immer noch wenig wissen und ihm trotz ihrer Unkenntnis keine Chance für die Zukunft gäben, darauf an, dass auch von Seiten der Politik die Notwendigkeit einer Spra-

chenpolitik erkannt werde, die sich an der Gleichwertigkeit der Sprachen und deren Kulturen orientiere. Grötzner wies auf die Zeit der Entstehung der Bamberger Esperantogruppe hin: Damals, vor dem Ersten Weltkrieg, habe



es eine Reihe von Bewegungen zum Abbau internationaler Spannungen und zum Brückenschlag zwischen Völkern und Menschen gegeben. Er nannte das durch Henri Dunant ins Leben gerufene Rote Kreuz, die Olympische Bewegung des Pierre de Coubertin, die Friedensbewegung, die über Alfred Nobel von der ihm befreundeten Bertha von Suttner sowie deren Mitarbeiter Alfred Hermann Fried ausging und eben auch

die Bewegung für eine leicht erlernbare, allen auf einfache Weise dienliche Sprache, deren Begründer Ludwik Lejzer Zamenhof war. Auch an andere Initiativen wie etwa die Christliche Ökumene oder z.B. die Rotarierbewegung

wäre zu denken, alle mit dem Ziel, dem Frieden unter Menschen, Gruppen und Völkern zu dienen.

Diese allzu oft als „idealistisch“ verschrienen Bestrebungen schienen in den Katastrophen des nachfolgenden 20. Jahrhunderts unterzugehen, überlebten aber dank der urmenschlichen Sehnsucht nach Frieden und Verständigung. Die europäische Esperantobewegung, so Grötzner, setze sich heute ein für eine realistische, vor allem auch gerechte Sprachenpolitik und wolle mitwirken, so ein europäisches Identitätsbewusstsein zu schaffen und zu stärken. Der Empfang wurde umrahmt von einem Schülerchor des Clavius-Gymnasiums.

Der Bamberger Romanist Prof. Dr. Martin Haase (oben, Mitte) sprach über „Sprachplanung und Plansprachen“. Der Nürnberger Bardensänger Sergey Orlovsky bereicherte den Tag mit von ihm komponierten Esperanto-Liedern.

nach einem Bericht von

Armin Grötzner, BELO-Vorsitzender



Nova elpaŝo de UEA ĉe UN

Reprezentantoj de UEA aktive partoprenis la Forumon de Unuiĝintaj Nacioj pri la demandoj rilate al malplimultoj en Ĝenevo la 15an kaj 16an de decembro. La du reprezentantoj, Stefano Keller kaj Cescio Reale, ricevis la okazon alparoli la Forumon dufoje. Dum sia elpaŝo Stefano Keller prezentis ree la starpunkton de UEA pri lingvaj homaj rajtoj, kiun oni povas legi en <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eo/lingvaj-rajtoj.html>, kun aparta atento al la lingvoj en la instruado.

Cescio Reale parolis pri Esperanto kiel defendilo de lingvaj rajtoj. Li klarigis ke Esperanto estas justa solvo kaj facile lernebla. Krome, „pro ĝia simpla kaj regula gramatiko, ĝia lernado helpas la regadon de aliaj fremdaj lingvoj, kaj [...] ĝi estas aparte taŭga por la bazlernejaj lernantoj, al kiuj ĝi donas lingvan bazon sen minaci ilian gepatran lingvon.“

En la fino de la kunveno UEA prezentis proponojn pri amendoj al „Rekomendoj pri malplimultoj kaj pri la rajto je edukado“, ankoraŭfoje insistante pri la neceso protekti la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj kaj specife pri la rajto de infanoj lerni pere de sia gepatra lingvo.

Gazetara komunikado de UEA 311

Vikipedio

Meze de junio 2008 la vikipedio en Esperanto atingis 100 000 artikolojn. En tiu momento ĝi estis la 20a vikipedio kiu atingis tiun kvanton, sed la Esperanto-vikipedio perdis terenon. Jam kelkajn tagojn post tiu evento la vikipedio en la ĉeĥa lingvo superis la Esperanto-vikipedion.

Kiel nun estas la situacio hodiaŭ, je la 12a de oktobro 2008 frumatene (en Eŭropo)? Hodiaŭ la Esperanto-vikipedio atingis 105 000 vortojn. Momente ĝi estas je la 22a loko de la vikipedioj. Intertempe ankaŭ la hungara vikipedio superas la Esperanto-vikipedion. Inter la 5a de julio 2008 kaj hodiaŭ la kunlaborantoj meze kontribuis 42 artikolojn. Rilate al la kontribuoj la Esperanto-vikipedio estas je la 29a loko. Momente la vikipedioj en la dana, indonezia, hebrea, korea, litova, araba, bulgara,

vjetnama kreskas pli rapide ol la Esperanto-vikipedio.

Bonvolu kunhelpi ĉe tiu projekto. Se nur pliaj 350 personoj ĉiusemajne skribus aŭ tradukus artikolon, la meza averaĝa kvanto estus 92 artikoloj, do en loko 19. Tutklare ankaŭ gravas la kvalito. Ankaŭ rilate al la kvalito la Esperanto-vikipedio bezonas pliajn helpantojn.

Mi komparis entute 51 vikipediojn. Bedaŭrinde pro lingvaj problemoj mi ne sukcesis eltrovi la evoluon en la hindia lingvo, en la persa lingvo kaj en kelkaj aliaj lingvoj. *Martin Schaeffer*

Sprachlich Interessierte

Wer sich für Sprachliches interessiert und Deutsch versteht: <http://de.wikipedia.org/wiki/Benutzer:Ziko/Handbuch-Titel>

Ziko van Dijk

Liro-2008

La juĝkomisio de la tradicia literatura konkurso Liro-2008 (Aleksij Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de La Ondo de Esperanto, ricevis 36 konkursaĵojn de 26 aŭtoroj el 15 landoj – Brazilo, Britio, Burundio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Kazahŝtano, Pollando, Rumanio, Ruslando, Ukrainio, Usono. (Pasintjare partoprenis 24 konkursaĵoj de 20 aŭtoroj el 7 landoj.)

La rezulto de Liro-2008: Originala prozo: Laŭreato: Miĥail Korotkov (Ruslando) pro „Io devas okazi“; Laŭdaj mencioj: Paul Gubbins (Britio) pro „Reunuiĝo“, Lenke Szász (Rumanio) pro „Tatjana“. Originala poezio: Laŭreato: Ljudmila Oraĵevskaja (Ukrainio) pro „Vintro“; Laŭdaj mencioj: Alona Akimenko (Ruslando) pro „Mi deziras atingi l' ĉielon ...“, Benoît Philippe (Germanio) pro „Triptiko por patro“ kaj „Triptiko por patrino“. Traduka poezio el la rusa lingvo: La konkurso ne okazis, ĉar venis nur unu konkursaĵo. Traduka prozo el la rusa lingvo: Laŭda mencio: Anna Pentus kaj Mati Pentus (Ruslando). La premio ne estas aljuĝita, ĉar partoprenis nur du

konkursaĵoj. Traduka prozo el la angla lingvo: („Aloha Oe“ de Jack London) Laŭreato: Scott Page (Usono). Laŭda mencio: Russ Williams (Pollando).

*Halina Gorecka
sezonoj@kanet.ru*

Rondo UKn Pripensi

Dum la 25a Internacia Festivalo Tacuo Huĝimoto prezentis la Rondon UKn Pripensi. Celoj de la rondo estas interalie: pensi pozitive pri tio, kiaj estontaj UK-oj kaj plani plivigligon de UK-oj, proponi al UEA realigeblajn ideojn pri UK kaj kunlabori por iliaj efektivigoj, pozitive aliĝi ankaŭ al aliaj internaciaj eventoj krom UK por sperti aparte esperantecajn plezurojn. Povas membriĝi en la Rondo UKn ĉiuj, kiuj aprobas la celojn de la Rondo kaj partoprenas en la aferoj aranĝataj de la Rondo. Kontaktadreso: 606-8266 Kubota 31, Kioto, Japanio, +81/757233201, officejpea@yahoo.co.jp

laŭ informo de Tacuo Huĝimoto

Korespondado

Mi loĝas en Kubo. Mi estas 39-jara bibliotekistino kaj lernantino de Esperanto. Mi deziras korespondadon kun personoj (bibliotekistoj, instruistoj, ...) en Germanio.

*María de los Angeles González Valdés
Calle 49 #203NE entre 2 y 4
Cienfuegos. CP. 55100. Cuba
marangeles69@yahoo.com*

Pozitivaj kaj negativaj eventoj

„Kiuĵn Esperanto-eventojn en 2008 vi taksas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j)?“ En la januara kajero de *La Ondo de Esperanto* ĉi tiun tradician demandon respondas naŭ aktivuloj: Renato Corsetti, Probal Dasgupta, Vjaĉeslav Ivanov, Li Jianhua, Jakvo Schram, Giorgio Silfer, Spomenka Štimec, Humphrey Tonkin kaj Madeleine de Zilah. La respondoj, kiuj estas divers-aspekte interesaj, legeblas en la novaĵrubriko de *La Ondo de Esperanto*.

*laŭ informo de
<http://esperanto.org/Ondo/index.html>*